# LIGILO

DE

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-ro 20 - OKT/NOV/DEC 1993

# KARA LEGANTO

"NI FOSU NIAN SULKON"

**La homoj estas samtempe spektantoj kaj partoprenantoj en la ŝanĝoj okazantaj en la mondo. Kaj la simplaj mortemuloj pli kaj pli konsciiĝas pri siaj fortoj kaj kapabloj influi tiujn ŝanĝojn, kiuj, lastanalize, survojas al elimino de la grandaj problemoj ekzistantaj en nia planedo. Tiu konsciiĝo ne okazas hazarde kaj sen luktoj kontraŭ la konservativaj fortoj, kompetente organizitaj kaj agantaj defende de siaj interesoj. Feliĉe ke la teknologiaj progresoj plirapidigas la noblajn konkerojn de la homa spirito. Antaŭ kelkaj jardekoj areto da homoj kaptis la atenton de la homaro, alfrontante per siaj fragilaj barketoj imponajn ŝipojn. Nuntempe la ekologia movado akiris la rajton je la mondcivitaneco kaj enpenetris ĉiujn tavolojn de la tutmonda socio. Kaj nur post tiu atentokapta konkero la konservativaj fortoj kaj la politikistoj alproksimiĝis al la ekologia movado... kelkiuj eble por ĉerpi la koncernajn profitojn... Ni, la esperantistoj, havas proponon por plibonigi la kvaliton de la ŝanĝoj okazontaj en la mondo. Kaj same kiel okazis al la ekologiistoj, koncernas al ni lukti, labori kaj agi por kapti la atenton de la homaro pri la problemo de la internacia komunikado. Ni ne estu naivaj! En la nuna evolustato de la homoj, la progreso de nia movado dependas esence nur de ni! Ne venis ankoraŭ la tempo (kiel longe ni atendos?) en kiu la registaroj, la internaciaj organizoj, la kontrolantoj de la mondaj financoj kaj la politikistoj - kun raraj esceptoj, kompreneble - favoros la ideon de la internacia lingvo. Do, ni profitu la etoson de tiuj festaj tagoj por profunda pripensado kaj akiro de fortoj aplikeblaj en la venontjaraj laboroj por kreskigi en nia lando la semadon de niaj idealoj. Kaj ankoraŭfoje ni invitas vin fari tion kune kun ni! Kompetente organizitaj, ni ankaŭ agadu defende de niaj interesoj, por atingi la dezirindajn rezultojn. Feliĉan Kristnaskon! Kaj la Nova Jaro alportu al ni ĉiuj multe da ĝojoj kaj fortoj, por ke entuziasme**

"NI FOSU NIAN SULKON!"

# LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 70084-970 Brasília (DF) Telefone [061] 226-1298

Aperas trimonate Redaktas BEL-Estraro



## ESTRARO DE BEL

Prezidanto ...............Francisco Mattos de Oliveira
1-a Sekretário ..........José Carlos Dorini Ramos
2-a Sekretario ..........Wilson Álvares de Oliveira
3-a Sekretario ..........Lício de Almeida Castro
1-a Kasisto ..............Aymoré Vaz Pinto
2-a Kasisto ..............Maria das Dores Góes

### Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

### Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

## PREZIDANTO DE LA FEDERACIA KONSILANTARO

Ivaldo Alves de Souza

## KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

## LIBROSERVO

Adolpho de Miranda Silva
Francisco Mattos de Oliveira

## PERKORESPONDA KURSO

Carlos Maria
Francisco Mattos de Oliveira

## INFORMADIKO

José Carlos Dorini Ramos
Wilson Álvares de Oliveira

## ARKIVO

Cleto Galvão da Silva

# FONDAĴO ALMADA

Pliaj donacoj: S-ro Carlos Prates Castanho, el São Paulo, CR$ 4.150,00; S-ro José Dias Pinto, el São Paulo, CR$ 5.000,00 (dua kontribuo), S-ro José Pedro Milagres, el São Gonçalo, CR$ 500,00 (dua kontribuo); D-ro Sidney Assis Brasil, el Anápolis, CR$ 2.700,00 (tria kontribuo). Koran dankon!

Saldo de FA-konto ĉe Banco do Brasil, en la 7-a/12/93-CR$ 832.000,00

Laŭ decido de la Federacia Konsilantaro de BEL, estas kunfondantoj de Fondaĵo Almada tiuj, kiuj ĝis la 29-a Brazila Kongreso de Esperanto, julie 1993, donacis pli aŭ samvaloron al 26 usonaj dolaroj (Cr$ 100.000,00 je la komenco de la kampanjo). Kun granda plezuro ni listigas iliajn nomojn:

Adolpho de Miranda Silva, Adonis Marcelo Saliba Silva, Alberto Flores, Alberto Guedes Curopos, Altino Araújo Vasconcellos, Audino Castelo Branco, Aymoré Vaz Pinto, Caio Marcio Pereira Lyrio, Carlos Fernando Pettinati Ramos, Carlos Maria, Cláudia Helena Pontes Amendola, Cláudio Raymundo S. Spinelli, Délio Pereira de Souza, Denise Arneiro Deslantes, Elias de Lima, Elvira Fontes, Enzo Forgiarini, Evaldo Pauli, Evaristo Manoel Pereira, Felicíssimo Rosa Borges, Francisca Martos, Francisco Mattos de Oliveira, Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Gilbert René Ledon, Giuseppe Grattapaglia, Ivaldo Alves de Souza, Jair Salles, Jason Gonçalves de Lima, Joaquim do Couto, José Carlos Dorini Ramos, José Dias Pinto, José Mário Marques, José Maurício da Silva, José Passini, José Pauluk, José Pedro Milagres, José Romão Filho, Lauro Jorge de Oliveira, Manoel Borges dos Santos, Manoel Torres Abreu, Moacir Eustáquio da Silva, Néia Lúcia Souza, Neima Cardoso Adorno, Neusa Priscotin Mendes, Neuza Caldas Figueiredo, Nydia Aydos Krieger, Onésimo da Costa e Faria, Osvaldo Pires de Holanda, Paulo Amorim Cardoso, Paulo Cesar Sartor de Oliveira, Paulo Roberto Siqueira Silva, Raul Conde, Regina Helena de Mello Baldovino, Regina Margarida Marques Lemos, Roberto Vieira Resende, Ronie Cardoso Filho, Rosária (?), Sebastião Pimentel de Assis, Sérgio Neri da Mata, Sidney Assis Brasil, Silvia Maria Buhler, Sirio Silva, Tobias Ferreira, Walkiria Vernacci Lara Rubio, Wilson Álvares de Oliveira, Wilson Pereira Deslandes.

**AL ĈIUJ BEL-ESTRARO ELKORE DANKAS!**

# TRA BRAZILO

BRASÍLIA (DF) - En la 9-a de julio ekfunciis "Taguatinga Esperanto-Klubo" (Cx. Postal 05242, CEP 72001-970). Tuj post ĝia fondo, TEK komencis Esperanto-Kurson gvidata de S-ro Carlos Maria, monitoro de la Perkoresponda Esperanto-Kurso de BEL. En la 3-a de oktobro dua grupo de lernantoj ekkomencis bazan kurson.

La juna komponisto kaj muzikisto Flávio Fonseca pro sia verko "Babelturo" gajnis la premion "An-okin" okaze de la Belartaj Konkursoj, kadre de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto , okazinta ĉi-jare en Valencio (Hispanio).

Kiel okazis en la lastaj jaroj , la gelernantoj de la kurso pri Socia Komunikado de CEUB (Centro de Ensino Unificado de Brasília) ricevis de la Prof-ro Newton de Oliveira Quirino kiel lerntaskon la temon: "Kiuj baroj malhelpis Esperanton atingi sian celon grandskale en la mondo?" Estrarano de Ligo partoprenis la prezentadon de la laboro, kiam li konstatis la intereson de la gelernantoj pri la temo kaj la manko de informoj pri Esperanto en tiu Universitato. Informojn por la laboro la 12 prezentantoj ricevis ĉe BEL-sidejo. Eble en aliaj universitatoj la gelernantoj ne ricevas taskon pri la sama temo pro tio, ke ne troveblas literaturo pri Esperanto en la koncerna universitata-biblioteko aŭ en la urbo mem aŭ pri la fakto ke ni ankoraŭ ne kapablis veki la atenton de la profesoroj pri la internacia komunikado. Ĉu tiu vekigo ne estus tasko por la lokaj esperantistoj?

CAMPOS (RJ) - La plej tuja raporto pri la 29-a Brazila Kongreso de Esperanto aperis en la ĵurnalo "Tribuna Campista", de la 21-a de julio. Verkis ĝin S-ro Vivaldo Marcelino Silva.

Ĉirkaŭ 80 geesperantistoj kunvenis kun la tiea leĝfaranto, S-ro Sivaldo Abílio, aŭtoro de leĝprojekto celanta enkondukon de Esperanto en la urbaj lernejoj. Laŭ lastaj informoj, la projekto atendas la konkludojn de komisionoj, kiuj ĝin analizas.

CARUARU (PE) - Jen nova bela rikolto! Maria Socorro Bezerra Chaves, ekslernantino de nia Perkoresponda Esperanto-Kurso fondis grupon de E-o, kiu vigle funkcias. Ĝia estraro invitis Prof-ron Paulo Amorim Cardoso, emerita universitata profesoro el Fortazela, gvidi bazan kurson.

CURITIBA (PR) - De la 10-a ĝis la 12-a de septembro okazis en tiu ĉarma ĉefurbo la 7-a Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto. Prelegoj, diskutrondo kaj artaj aranĝoj estis la ĉefaj programeroj. S-ino Symilde Schenk Ledon representis BEL-estraron.

S-ro Marcelo Luiz Brasil (Rua Prof. João Doetzer 33, Jardim Santa Bárbara, 81540-190, Curitiba-PR) estas la rekta kontakto al tiuj, kiuj ŝatas radioaŭskultadon. Pere de faldfolio li diskonigas klubon, kiu pritraktas la temon, nome "Internacia Aŭskultado Klubo Pri Esperanto" aŭ simple "Distanca Ŝaltilo" (DŜ). Ĉiuj rajtas membriĝi al la klubo, kies aperonta informilo nomiĝas "La Voĉo de Esperanto". Por pliaj informoj bonvolu turni sin al S-ro Marcelo.

GOIÂNIA (GO) - "Zamenhof Editores" aperigis belaspektan kaj riĉenhavan gazeton nome "BRAZILA HEROLDO". BEL peras ĝin kontraŭ Gld 27,00.

La organizantoj de la I-a Brazila Kongreso de Interlingvistiko kaj Esperantologio "Zamenhof Editores" kaj "Agenda Assessoria e Consultoria" informis, ke pro la malgranda nombro de aliĝoj - nur 18 - ne eblis okazigi la eventon.

ILHÉUS (BA) - "Grafitinho" estas okpaĝa bulteno, kiun librovendejo "Grafite" dissendas al siaj klientoj. BEL ricevis ekzempleron enhavanta noteton pri E-o. Kvankam unuavide tio ŝajnas tro modesta kontribuo por nia komuna idealo, ni ĝin mencias por memorigi, ke se ĉiu esperantisto enmetos poresperantajn informojn en kiu ajn komunikilo, pligrandiĝos la nombro de homoj informitaj pri Esperanto.

MACAPÁ (AP) - Ĵurnalo "Diário de Amapá" , de la 20-a de aŭgusto, aperigis tutan paĝon pri E-o. La ĵurnalisto Edi Prado intervjuis eks-prezidanton de BEL, F-ino Néia Lúcia Souza, kaj verkis grandan artikolon kun la sekvantaj eroj: Kio estas Esperanto; Lingvo por ĉiuj; Demokratiigi la komunikadon; Neŭtrala lingvo; Kiel kaj kie lerni E-on.

NITERÓI (RJ) - En la 12-a de septembro okazis festo omaĝe al la 46-a datreveno de Niteroj Esperanto-Klubo. BEL-estraro gratulas la tieajn esperantistojn kaj profitas la okazon por danki al NEK pro la aŭgusta numero de Niteroja Bulteno, kiu simpatie stimulas siajn legantoj aniĝi al BEL.

Estas de Asocio Kooperativo-Esperantista la jena teksto, kiun ni transkribas: "KOOPERATIVISMO KAJ ESPERANTO EN BIBLIOTEKOJ - Asocio Kooperativo-Esperantista (AKE), konsiderante unu el siaj statutaj celoj, sugestas al kooperativistoj kaj al esperantistoj fari donacojn de libroj, novaj aŭ malnovaj, pri KOOPERATIVISMO kaj pri ESPERANTO al la bibliotekoj, publikaj aŭ privataj, de siaj urboj aŭ kvartaloj. Siavice, AKE estas formanta sian propran bibliotekon kaj donacanta librojn pri tiuj temoj al la bibliotekoj publikaj kaj privataj de Niterói

najbaraj municipoj, krom esti organizanta sian 'Libroservon', konsiderante sian precipan celon: asistado, kun eventuala kooperativo-esperantista edukado, al necesbezonuloj el iu ajn aĝo; pro tio, AKE estas ankaŭ petanta kaj ricevanta donacojn pere de la poŝto (Poŝtkesto 100.0141 - Niterói - 24001-970) aŭ, provizore, pere de NITERÓI ESPERANTO-KLUBO (Rua Coronel Gomes Machado, 140, 4o. andar, Centro, Niterói-RJ)".

PIQUETE (SP) - Diomedes Rodrigues Leite, kiu regule diskonigis E-on pere de sia portugallingva bulteno "Piquete Esperante" forpasis je la 16-a de septembro. BEL kondolencas.

PORTO ALEGRE (RS) - Bulteno Esperantisto estas la oficiala organo de Esperanta Departemento Hector Hodler, de "Sociedade Espírita Irmão Miranda" (Rua Francisco Fraga Feijó 227, CEP 90690-210 Porto Alegre-RS) . Ĝin redaktas César Dorneles Soares. Kontraŭ 3 poŝtmarkoj vi ĝin ricevos.

Plia bulteno venas el tiu urbo, nome "Gesamideanoj". Dulingve, ĝi estas informilo de Esperanta Departemento de "Sociedade Espírita Allan Kardec".

Novan estraron havas Gaŭĉa Esperanto-Asocio. La prezidanto Reinaldo Zagheto kaj pliaj 10 membroj gvidos la asocion ĝis 1995.

RESENDE (RJ) - Je la 20-a de junio, 50 geesperantistoj venintaj el Ŝtatoj Rio de Janeiro kaj São Paulo okazigis la 13-an Renkontiĝon de Esperantistoj el Paraiba-Valo. Ĉe-estis la ĉefdelegito de UEA por Brazilo, S-ino Symilde Schenk Ledon kaj la UEA-regiona delegitoS-ino Denise Arneiro Deslandes. Kiel apogon al renkontiĝo, la urbestro de Resende permesis ĝian okazigon en la "Museu de Arte Moderna" kies oficistoj helpis la eventon ĝis ĝia fino.

RIO DE JANEIRO (RJ) - S-ro Givanildo Ramos daŭre informas pri E-o en ne-esperantista gazeto, nome "O Sol Nascente". La eldono de julio anoncis ĝuste la 3 kongresojn pri kiuj ni raportis en LIGILO n-ro 19.

SÃO PAULO (SP) - Je la 7-a de septembro estis fondita nova esperanta societo, nome Esperanto-Grupo Verda Lumo. S-ro Luiz Henrique R. de Araújo, la prezidanto, kaj pliaj 7 estraranoj gvidos la grupon ĝis 1995.

TERESÓPOLIS (RJ) - Tre interesa analizo titolita "Ĉu karakteriza finaĵo ĉe primitivaj adverboj?" verkita de S-ro Cleber de Moraes Lemos aperis en la gazeto Letero de L'Akademio de Esperanto. En sia analizo, kiu temas pri la malkonsento rilate al la finaĵo de la primitivaj adverboj *nepre, ofte, parkere, precipe, spite, supre kaj volonte,* S-ro Cleber prezentas kvar solvojn, el kiuj li preferas tiun, kiu propo-

nas konsideri tiujn vortojn ne adverboj, sed radikoj, al kiuj oni aldonas da adverban finaĵon "e". Post gratulo de Edwin de Kock, la gazeto finas la artikolon per la jenaj vortoj : "La kvara 'solvo' de Cleber Lemos estas taŭga; la Akademio elektis ĝin kaj oficialigis ĝin antaŭ 1975. Vortaroj nur sekvu".

UBÁ (MG) - La Verda Formiketo n-ro 22/93, trimonata bulteno de Esperanto-Klubo João Ernesto, informas ke nova estraro respondecas pri la klubo ĝis 1995. La estraro havas 10 membrojn. La prezidanto estas D-ro Waner Marlière Arruda.

VOLTA REDONDA (RJ) - En la 5-a de decembro ĉi-jare okazos la 15-a Renkontiĝo de Esperantistoj el Paraiba-Valo, en la "Escola de Engenharia Metalúrgica de Volta Redonda (UFF)".

# BEL-ANGULO

PROGRAMOJ/PROJEKTOJ

LIGILO n-ro 18 prezentis proponon de BEL, kiu celas profiti la ideojn, kapablojn kaj konojn de la brazilaj esperantistoj. Dum la 29-a Brazila Kongreso de Esperanto la propono estis aprobita de la Federacia Konsilantaro, kaj la unuaj reagoj jam aperis. Julieta Watanabe, Cristina Pancieri kaj Flávio Fonseca respondecas pri la projekto "Esperanto-kurso por infanoj". Sugestojn sendu al "Pique-Pega Arte e Produção Ltda." (Caixa Postal 3900, CEP 70084-970, Brasília-DF). Pri "E-o ĉe Ne Registaraj Organizaĵoj" (Sur la kampo de ekologia movado) respondecas Prof-ro Aristóphio Andrade Alves Filho, kies adreso por ke la "verduloj" sendu siajn kunlaborojn estas: Caixa Postal 396, CEP 57020-970, Maceió-AL". Prof-ro Paulo Amorim Cardoso zorgas pri "Agadplano ĉe universitata medio". Lin helpas Prof-ro José Passini. Kunlaborantoj sin turnu al adreso de Prof-ro Amorim, nome Caixa Postal 12162, CEP 60021-970, Fortaleza-CE. En Brasília, S-ro Elano Ribeiro Freire (SHIS QI 27 Conjunto 15, casa 7) pritraktas projekton, kiu celas enkonduki E-on en framasonan medion. Ni invitis Prof-ron Euclides Carneiro da Silva, por ke li respondecu pri la projekto "Agadplano ĉe katolika medio". Jen do la momento por ke ni laboru kune! Arigu viajn esperantajn amikojn, elektu projekton kaj ellaboru ĝin!

DONACOJ RICEVITAJ

Du anonimuloj donacis al Libroservo de BEL 10 ekzemplerojn de Metodo Zagreb (5 libroj kaj 5 kasedoj), kiujn ili ricevis de "Zamenhof Editores", kiel repago pro la ne okazigo de la 1-a Brazila Kongreso de Interlingvistiko kaj Esperantologio.
De S-ro Jorge Marcolino da Costa ni gajnis 400 tekojn, kiuj tre taŭgas kaj por la sekretariaj servoj kaj por la Perkoresponda Kurso.
Tre gravan donacon ni ricevis de S-ino Julieta Bonfim Gomes de Pádua. Temas pri manuskripto de Esperanta Vortaro, kompilita de ŝia forpasinta edzo Prof-ro Geraldo Pádua. BEL kortuŝe dankas al la donacintoj.

PRI DUBO KAJ CERTECO" FRANCLINGVE

Ni ricevis anoncleteron de firmao "Academia-Editions et diffusion", el Belgio, pri lanĉo de la libro "LES SENTIER SINUEX DE LA CONNAISANCE". Ĝi estas la franca versio de la verko "PRI DUBO KAJ CERTECO", de Prof-ro Evaldo Pauli. BEL-estraro respektoplene gratulas nian karan filozofon, Prof-o Pauli.

ANKORAŬ PRI KONGRESO

Pri la 54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio okazinta en Ribeirão Preto (LIGILO n-ro 19) menciinda estas la prelego "Bazaj Fundamentoj de Homeopatio". Prezentis ĝin D-ro Aymoré Vaz Pinto, eks-profesoro de Universitato de Braziljo (UnB), kuracisto kaj fakulo pri homeopatio. D-ro Aymoré estas la 1-a BEL-kasisto.

LA TAGO DE ESPERANTO

Kutime la esperantaj grupoj iel festas la 15-an de decembro. Supozeble la samo okazos ĉi-jare. Tiurilate, ni intencas publikigi pere de la venonta Ligilo veran mozaikon pri la temo. Tamen tion ni sukcesos nur se informmaterialoj alvenos al BEL-sidejo. Eĉ se la festo aŭ kunveno de via klubo estos tre modesta, ne hezitu raporti al ni la eventon. Fotoj estas bonvenaj !

FELIĈAN KRISTNASKAN FESTON, ELMA!

La unuan karton pri kristnaska festo ni ricevis de nia samideanino Elma do Nascimento, el Rio de Janeiro. Reciproke ni deziras al ŝi feliĉon kaj bonan novjaron!



# LASTE APERIS. . . sur nia bretaro

| TITOLOJ | Gld |
|---|---|
| 50 Fabloj de Ezopo | 4.00 |
| Al unu lingvo por Eŭropo? | 5.28 |
| Bilinguismo-utopia ou antibabel | 18.00 |
| Ĉu vi paloras tendare? | 13.20 |
| De Moseo al Andersen | 52.80 |
| Dicionário E-o / Portugues | Cr$ 630.00 |
| Ermitoj kuncelebris la majstron | 52.80 |
| Fabeloj de Andersen | 132.00 |
| franca periodo de E-o, La | 52.80 |
| Genia lingvisto venkita de etburĝeco | 5.00 |
| gimnazio, La | 11.00 |
| Historio pri sistemigo de kemiaj elementoj | 3.30 |
| Kanto pri minotaŭro kaj aliaj poemoj | 26.73 |
| Kiu malkovris oksigenion | 3.30 |
| Kvinpinta ludaro | 33.00 |
| Legolibro: de sezono al sezono (aŭtuno kaj vintro) | 11.50 |
| Ludovikologia | |
| Dokumentaro-III | 62.70 |
| Dokumentaro-VI | 62.70 |
| Dokumentaro-IX | 62.70 |
| Dokumentaro-XII | 62.70 |
| Memori kaj forgesi | 35.00 |
| Mikronoveloj de Sin'iti Hosi | 23.10 |
| nokto de la Ezoko, La | 33.00 |
| Perkomputila tradukado | 5.28 |
| Poemoj de Armand Su | 6.50 |
| Praavo kaj la kotokukoj | 16.50 |
| Salome | 4.00 |
| ŝalmisto de Hamelin, La | 6.60 |
| Tendaraj tagoj-kajero 1 | 13.20 |
| Vage tra la dimensioj | 11.00 |
| Vilaĝoj en batalkampoj | 3.50 |
| Vocabolario E-o/Italiano | 62.70 |
| Vojaĝoj kaj aliaj poemoj | 29.70 |

| TITOLOJ | Gld |
|---|---|
| Al nova internacia lingvpolitiko | 7.92 |
| Analiza historio de E-o Movado | 14.00 |
| Cent pri cent | 6.60 |
| Ĉinaj mitoj | 4.50 |
| De Mickieviĉ al Goethe | 52.80 |
| De vilaĝo al ĉefurbo | 8.91 |
| Du el | 16.50 |
| Etimologia vortareto Pragmata de Esperanto | 53.79 |
| Faru la kontrolon! | 33.00 |
| Fratoj eble ni estas | 16.50 |
| Geografio de miaj memoroj | 37.00 |
| Gimnastiko por cerbo | 12.50 |
| Grand Dictionaire Français/E-o | 103.00 |
| Infanoj en Hiroŝima | 6.00 |
| Jen la domo, kiun Joĉjo konstruis | 2.50 |
| Kemiaj afiksoj, nombroj, acidoj | 3.96 |
| Kial venkis Esperanto? | 4.50 |
| Kroata milita noktlibro | 33.00 |
| L'omnibuso kun la tri pasaĝeroj | 13.50 |
| Lingva Esperanto-Corso di base | 36.30 |
| Lingvo universala-Praesperanto | 10.23 |
| Ludovikologia | |
| Dokumentaro-V | 62.70 |
| Dokumentaro-VIII | 62.70 |
| Dokumentaro-XI | 62.70 |
| Lumo kaj ombro | 6.00 |
| Metodiko de E-o Instruado | 16.50 |
| Neĝa lando | 29.70 |
| Pardonon | 9.90 |
| Pocket English/Esperanto/English Dictionary | 31.35 |
| Rakontoj | 12.00 |
| Siberio en neĝo | 19.00 |
| Tartarin de Taraskon | 19.80 |
| Tendaraj tagoj-kajero 2 | 16.50 |
| Vi kuras de vi | 23.10 |
| Vivi estas danĝere | 23.10 |
| Vojaĝo en Esperanto-Lando | 33.00 |

-oOo-

O preço do Dicionário E-o/Portugues é em curzeiros reais e será reajustado mensalmente, a partir de janeiro/94. Os preços dos demais livros é em florim holandes. Para efeito de cálculo, 1 florim = 65% do valor de 1 dolar comercial (cotação em bancos, jornais e TV).

# Natal

10a ĝis 15a julio 1994

30a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Kun granda plezuro kaj intensa entuziasmo natalanoj sin dediĉas al la organizado de la venontjara 30-a BKE, sub la aŭspicio de BEL kaj rekta apogo de ĉiuj nordorientaj Esperanto-Asocioj. Temas do pri tutregiona tasko cele al plifirmigo de la E-grupoj en la regiono. Kompreneble la evento en si mem estas tutnacia kaj celas la kunfratiĝon, interamikiĝon, pridiskutadon kaj evoluigo de la E-Movado en Brazilo. Estas nediskuteble ke ĉi tiu ĉefa forumo lastatempe fariĝis pli kaj pli reprezenta de la E-Movado en la tuta lando, dank'al la pli nombriĝo de la partoprenantaro kaj sia altnivela programo. Tial la kunordigantoj antaŭvidas, jen pro sia klopodo jen pro la pozitiva reago de la esperantistaro, sukcesplenan kongreson. Pere de tiu ĉi numero, LIGILO havas la plezuran devon peri al BEL-membraro la unuajn informojn pri la venontjara kongreso de Natal.

1. LA TEMO: *Esperanto - aliro al lingvoj kaj kulturoj.* Eble unu el la plej ampleksaj temoj ligitaj al Esperanto kiel lingvo kaj movado estas ĝuste la ĉi-jara kongrestemo. Multaj eseoj, prelegoj jam publikiĝis dum la centjara ekzisto de Esperanto, tamen nur supraĵe esplorataj kaj utiligataj de la esperantistoj mem kaj bedaŭrinde preskaŭ nekonata de la ekstera publiko. De kelkaj jaroj oni multe laŭdas pri la propedeŭtika valoro de la lingvo, tio estas, pri la grandaj avantaĝoj ellerni Esperanton kiel unuan fremdan lingvon kiel bazon por pli facila kaj pli rapida lernado de aliaj lingvoj; pri la pliperfektiĝado de la gepatra lingvo pere de lernado de Esperanto; pri la mensa plivastigo rilate al la universalaj problemoj, solidareco kaj homa kunfratiĝo; fine pri la aliro al diversaj kulturoj ĉefe al tiuj konsiderataj minoritataj aŭ pli malproksimaj de la okcidenta kulturo. Jen do la forumo kie vi povos prezenti viajn konstatojn, spertojn pri via propra aliro al aliaj lingvoj kaj kulturoj pere de Esperanto eble tra filatelio, librolegado, radioaŭskultado, radioamatorismo, vojaĝado, gastigado kaj korespondado.

2. GASTIGADO: En Natal pli ol en aliaj urboj, la monato julio estas en plenturisma sezono. Sekve ĉiu kongresano devas la plej eble frue rezervi siajn loĝeblecojn, kiuj kutime ampleksas de pli simpla tranoktejo ĝis kvinstela hotelo. La koncerna komisiono vizitis ĉiujn gastejojn ĉirkaŭ la kongresejo kaj enlistigis ilin kun respektivaj kondiĉoj, prezoj (en dolaroj), telefonnumeroj kaj distanco de la kongresejo.

3. KOMUNA LOĜADO: La komisiono pri gastigado jam interkonsentis pri komuna loĝejo ĉe ŝtata lernejo kiu situas nur 2 km for de la kongresejo. Temas pri simplaj lernĉambroj (sur kies planko oni disponigos matracojn) kaj komunaj banĉambroj kaj necesejoj. LKK postulos simplan kotizon destinota al purigado de la komuna loĝejo. Disponeblas en la komuna loĝejo nur 150 lokoj.

4. MANĜOSERVO: Pli ol dek bonkvalitaj restoracioj troviĝas en la apudeco de la kongresejo, kiu servas tag- kaj verpermanĝojn bongustajn, vegetarajn aŭ ne, laŭpeze aŭ ne, je ne tro altaj prezoj (varie de US$ 2,00 ĝis US$ 10,00). La koncerna komisiono konsideras la eblecon intertrakti kun fidinda restoracio kiu povu manĝoservi en la kongresejo mem je simpla prezo.

# CAMPANHA BRASIL ESPERANTISTA

Já começaram a chegar os primeiros pedidos de livros para colocação em bibliotecas e bancas de jornais/revistas, como gratificante reação à Campanha por nós desencadeada, visando levar o Esperanto aos mais diversos meios da sociedade brasileira. Antes do lançamento, alguns diretores da Liga iniciaram a experiência na livraria da Universidade de Brasília (UnB) e em 2 bancas de jornais/revistas num bairro residencial da cidade. Em apenas dois meses - outubro e novembro - foram vendidos 16 livros diversos e 1 fita cassete! Conclamamos a todos, pois, que participem de mais esse esforço no sentido de divulgar o ideal de Zamenhof por todo o nosso país.

-o0o-

Aproveitamos para lembrar aos interessados em participar da Campanha que não é obrigatória a aquisição de todos os títulos listados no impresso que trata do assunto. Entretanto, para ter direito a qualquer desconto, a quantidade mínima para compra é de 3 exemplares - do mesmo título ou de títulos diferentes. Outrossim, esclarecemos que os valores listados no referido impresso são os preços de venda, ou seja, aqueles que deverão ser praticados pelas bancas de jornais/revistas. Os preços que cobraremos dos que participarem da Campanha serão de valor inferior. Finalmente, pedimos alterar para 45 selos o valor do livro "Bilinguismo- utopia ou antibabel", do Prof. José Passini.

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Cx. Postal 03625 Telef (061) 226-1298
70084-970 BRASÍLIA - DF BRASIL

IMPRESSO